



# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://storm.prohosting.com/jesuo/k53.htm>

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>

Kio estas SAT?

Naturista  
vivo ŝanĝas  
kolorojn.



La  
sindromo  
de Babel



©Leif Heilberg, de  
*Naturista Vivo*

*Karelia, deĵora kongreso*

Nº 53

Januaro/marto 2002

# Kajeroj

---

## el la Sudo



### BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

**Prezidanto:** **Juan Antonio Cabezos Martínez,**  
c/ Jabonerías, 6-3<sup>o</sup>D,  
ES30 001 Murcia (Hispanio)

**Sekretario:** **José Pina Tuells,**  
c/ St<sup>a</sup> Teresa, 22-2<sup>o</sup> CD,  
ES30005 MURCIA

**Libroservo:** **María del Mar Guirao Gallego,**  
Avd<sup>a</sup> Juan Carlos I, 22-8H  
ES300800 Lorca

**Kasisto:** **José María Bernabéu Franco**  
Gral. Primo de Rivera, 8  
E-03360 Callosa de Segura,  
ALICANTE (Hispanio).

**Redaktoro:** **Jesuo de las Heras,**  
Apartado 4461  
ES30080 MURCIA

*Kajeroj el la Sudo* regule interŝanĝas kun:

- 1 *Esperanto*, redaktata de István Ertl,
  - 2 *Monato*, de Stefan Maul,
  - 3 *Juna Amiko*, de Geza Kuruez,
  - 4 *Sennaciulo*, de Krešimir Barkovič,
  - 5 *SAT-Amikaro*, de Jean Selle,
  - 6 *Internaciisto*, de Luis Serrano.
  - 7 *La Kancerkliniko*, de Jak le Puil,
  - 8 *Litova Stelo*, de Petras Čielauskas,
  - 9 *Liberecana Ligilo*, de Ĵakvo Schram,
  - 10 *Laŭte!*, de C. Baudé,
  - 11 *La Migranto*, de Antje Noordewier,
  - 12 *ES-TO*, de Aŭrora Bute,
  - 13 *SLEA-Informilo*, de P. Persson,
  - 14 *Naturista vivo*, de Jozefo Nemeth,
  - 15 *La verda proleto*, de komitato.
- Al ĉiuj, dankon pro viaj subteno kaj lernigo.

*Pretigas la Kajeron:*

*Provkokrekto:* **José Pina Tuells**

*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la nova konto*  
n<sup>o</sup> **0182 1854 47 0202 655 116** en libreta de  
BBVA. Sen aldona kosto. La abono kostas 1000  
pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.



Ne subskribitajn  
artikolojn verkis  
la redaktoro.

**Oni povas  
reprodukti  
artikolojn,  
kondiĉe ke oni  
citu la originon.**

**Kovrilo:** Bela Lila montras en plaĝo Kúa Bej de Havajo  
rektan manieron praktiki Esperanton nature. Alimaniere  
praktikas Julinka en Karelio, Rusio. Inter ili, *La  
sindromo de Babelo*. Nia alia grava temo estas SAT.

## Enhavo

Redaktore .....	3
Informoj de la prezidanto .....	4
Séte, la staĝo .....	4
Babilu esperantlingve pere de la reto .....	5
Kursoj de Esperanto de KAE 2001 .....	7
La Sindromo de Babel' .....	8
Denove naturista vivo .....	18
Akra reago .....	19
Kio estas SAT? .....	21
Viuelo .....	27
Statuto de SAT .....	28

*Ni ne korespon-  
dos pri nepetitaj  
artikoloj. Tamen, ni  
klopodos publikigi  
ĉiun artikolon kies  
enhavo estas intere-  
sa kaj ne mistraktas  
iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de  
la artikoloj  
respondecas la  
aŭtoroj mem, ne la  
redakcio.*

## Redaktore:

Denove plaĉus al mi diri ion pri la filozofio de nia magazino. Mi scias ke ĝi ne estas — kvankam mi celas — la plej inda magazino



en Esperantio, kaj ĝi havas multe da mankoj. Tamen, nia intenco ne estas fari multe da mono, aŭ disvastigi Esperanton. Tio, ke Esperanto estus tutmondigita, vere helpus al ni, kaj ja estus

dezirinde. Tre valoraj homoj faras tion rekte. Nia vojo estas *nerokta*, sed pli agrabla. Nia klopodo direktiĝas al alia pli ĝentila publiko, al tiu esperantista. Niaj legantoj jam scias pri Esperanto, kaj volonte legas ĝin. Estas vere, ke multe da ili ne povas elspezi multe da mono en magazinoj, pri kiuj estas multe laŭ la esperanta etoso. De kiam mi ekrespondicis pri la magazino, mi sopiris al *disvastigi uzon* de Esperanto. Laŭ 22 numeroj, mi esperas, ke mi tion iom faris. De mia unua numero, mi enretigis la magazinon, kaj la reta versio ĉiam estis senpaga. Kial peti monon por tio, kion oni povas havi senpage en la reto? Jen bona demando. La respondo povas esti eĉ pli bona: **ni ne vendas magazinon! Kajeroj el la Sudo** estas bulteno de kleriga asocio laborista, HALE, kaj nia celo ja ne estas enriĉiĝi. Almenaŭ ne mone. Ni havas trezoron, Esperanton, kaj ni uzas ĝin por pliriĉigi nin mem kaj aliajn homojn, per ĝia uzo. Ni uzas opiniojn, ideojn kaj eĉ diskutojn — verajn vigligilojn pri ideoj —, kaj la rezulton, numerojn de la revuo, ni metas en Interreto je la dispono de ĉiuj. Evidente, tio kostas monon. Ni, por tio, petas al

ĉiu laboristo esperantista — ĉu emerita, ĉu aktiva —, ke li aŭ ŝi abonu al la magazino, ĉar tion farante, oni helpas nin en nia klopodo. La kotizo ne estas alta, nur 6 eŭroj jare. Kaj kiel memoraĵo de nia laboro, ni sendas la surpaperan version al abonantoj, kiuj estas la solaj subtenantoj de nia agado. Estas ĉirkaŭ 70 abonantoj nun. Tamen, la lastan numeron de la magazino jam legis 650 per Interreto en la momento, kiam mi skribas tion. Granda sukceso, laŭ mi, kvankam mone la afero ne rilatu.

Oni trovas la prelegon de mi antaŭe promesita, **La sindromo de Babel**, kiun eble multaj el vi, legantoj, atendis legi, finfine en la paĝo 8-a. Mi esperas, ke ĝi estos utila al vi. Se bezone, mi pretas respondi ĉiun ajn demandon pri ĝi. La **alia juvelo** de ni prezentata en nia magazino estas la priskribo, kiun Julinka Litvinova faras pri la **Babilejo Karelia** de Interreto, en paĝo 5-a. Nun eblas havi veran kongreson virtualan ĉiun tagon en Interreto. Se vi, leganto, havas komputilon kaj modemon, vi povas havi tujan kongreson kun kelkaj homoj de ĉia ajn parto de la mondo nun kaj ĉiun alian momenton. Tion rakontas al ni la kunkreintino de la afero. Ni danku ŝin.

Estas ankaŭ grava afero, malpli brila, mi konfesas, pri la lasta krizo de SAT, kiu tuŝas min rekte. Temas pri akra reago al mia raporto pri la kongreso de SAT en Hungario. La leganto legu la artikolon de Jakvo Ŝram en paĝo 19a, kaj sekvantan respondon mian. Mi ne celas pravi. Nur klarigi pri mia persona opcio, kaj kiel tio harmoniigas al mia institucia rolo en HALE.

Mankas la kutima ĉapitro de **La Faraono**, bedaŭrinde, pro manko da spaco. Tio, mi esperas, ne plu okazos. Ni daŭrigas la publikigadon de la interesa verko de Prus la venontan marton.

Mi esperas, leganto, ke vi trovos nian laboron sufiĉe leginda kaj diskutinda. Mi atendas viajn reagojn.

Dolĉeamare salutas vin,

*Jesuo*

## Informoj de la prezidanto



Denove nia asocio kaj nia revuo devas defendi liberecon kaj liberecon kritiki.

Ni ne estas faŝistoj aŭ fanatikuloj de la religio, kiu atakas aŭ kritikis liberecon pro malamo.

Veras, ke la artikolo publikigita en *Kajero el la Sudo* kritikis SAT-on.

Logiko diras, ke kiam iu aŭ io kritikis nin, ni devas rakonti niajn argumentojn; sekve, se oni atakas SATon, satanoj aŭ SATdefendantoj devas oferti siajn argumentojn.

Antaŭ kelkaj monatoj la redaktoro kaj la Prezidanto de Hale konsentis publikigi artikolon verkitan de hispana faŝisto. Li atakis per lia artikolo kapitalismon. Mi esperis, kiam ni decidis publikigi ĝin, ke la supereco intelekta de esperantista laboristo detruas la argumentojn de la faŝisto. Neniun artikolon ni ricevis, kiu detruis la argumentojn de la faŝisto, sed ni ricevis artikolojn atakante la redaktoron pro tio, ke li publikigis tiun artikolon.

La supereco intelekta de esperantista laboristo ne aperis.

Kun la kritiko al Sat okazas same: la SATanoj devas detru la argumentojn de Jesuo de la Heras sed ne ataki *Kajerojn el la Sudo* pro tio, ke oni kritikis SATon.

Argumentoj, argumentoj, argumentoj: se ne ekzistas argumento, ne ekzistas la cbleco paroli.

Se ne ekzistas argumentoj ni povas nek plibonigi SAT-on, nek HALEn, nek *Kajerojn el al Sudo* nek la Esperantan Movadon.

Se la SATanoj ne havas argumenton por defendi SATon, detruante la argumentojn de Jesuo de las Heras aŭ de iu alia, la solvo estas facila: la SATanoj, denove, devas iri lernejon por lerni.

### Sete, la staĝo



De 24<sup>a</sup> de aŭgusto al 31<sup>a</sup> de aŭgusto 2002 okazos la 28-a internacia semajno ĉe mediteraneo en Sète (suda Francio). Inf : Esperanto Culture et Progrès 5, rue du Docteur Roux - FR 34090 Montpellier Francio -Tel 04 67 54 15 43.

Rete : [yvieme@netcourrier.com](mailto:yvieme@netcourrier.com)  
 aŭh [nikolao.k@wanadoo.fr](mailto:nikolao.k@wanadoo.fr) ,  
 TTTpaghon <http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>

## *Babilu Esperantlingve pere de la reto!*

*a historio de unu el la babilejoj de GIEB*

*("Granda Interligita Esperanto Babilejaro").*

*Saluton!*—estas la unua esperantlingva vorto kiun mi lernis antaŭ iom pli ol du jaroj ("mi" - 21jaraĝa studentino). Mi eklernis Esperanton vizitante kurson de



Julinka Litvinova

la esperanto-klubo en mia urbeto - Tihvin, Rusio. Kiel verŝajne multaj komencantoj, mi suferis pro la manko de la esperantlingva komunikado. Mi tiam ankoraŭ ne ekhavis esperantamikojn, ne partoprenis aranĝojn kaj malaktive partoprenis vivon de la loka klubo.

Kaj kiel onta lingvoinstruisto mi bone scias ke ja nur komunikado helpas plibonigi parolkapablojn en iu ajn lingvo.

Mi uzis diversajn retajn serĉilojn por trovi esperantlingvajn librojn, informojn, kantojn ktp., multe legis sed

daŭre ne havis eblecon paroli, mem esprimi pensojn kaj ideojn en Esperanto.

Iam mi bonŝance trovis Esperantan Korespondan Servon (EKS), kien mi tuj enmetis propran anoncon. Ekde tiam mi ekhavis multajn interesajn korespondamikojn el diversaj partoj de la mondo, kio estis mirinde por mi. Certe korespondado ege helpis pli bone lerni la lingvon, sed, verdire, daŭre mankis komunikado en reala tempo, ja legi kaj respondi retmesaĝojn mi povis kun la helpo de la vortaro - kies helpo estus malutila dum dialogo kun esperantisto, renkontiĝo, aranĝo.

Vesperon telefonis al mi nekonata esperantisto. Li diris ke li estas ĵurnalisto el Afriko, Senegalio, kaj informis ke li verkas momente artikolon pri vivo de studentoj el diversaj landoj. Li telefonis al mi por demandi pri mia studenta vivo. Kiel vi komprenas iom trokostas telefona intervjuo inter Afriko kaj Rusio, do li proponis ke ni renkontiĝu en iu reta babilejo ĉar tiel estus malpli koste kaj samtempe facile eblos registri kaj demandojn kaj respondojn.

Post tri malsukcesaj provoj (ni forgesis pri tempdiferenco kaj teknike por mi malbone funkciis foraj babilejoj, kiujn li proponis) ni finfine renkontiĝis en rusa babilejo. Evidente, li ne parolis la rusan kaj havis problemojn uzante babilejon, kiu estis kreita por ruslingvanoj. Tiu historio donis al mi ideon: devas ekzisti



babilejo por esperantistoj, facile atingebla, sen iu ajn registrado kaj kun ĉiuj subskriboj kaj reguloj en Esperanto.

Sed (konfesu mi) mi estas tre malsperta komputilisto, do mem mi ne kapablis krei ion bone funkciatan. Tiam mia amiko - Uhr (Aleksandr) (bedaŭrinde ĝis nun ne esperantisto) decidis ke reta babilejo por esperantistoj povos esti bona donaco por mi. Do, li dum iom da tempo programis ion sekrete de mi kaj poste li montris al mi unuan varianton. Mi facile esperantistigis malmultajn vortojn kiuj aperis en la enireja paĝo, sed evidentiĝis ke supersignoj tute ne montriĝis tie. Li neniam antaŭe spertis programadon de la supersignoj kaj plus li tre volis ke ni du povu paroli tie ruslingve. Unue li memstare provis solvi tiun problemon, poste petis min demandi iun el esperantistoj pri tiu problemo. Jes, kelkaj homoj rapide repondis sed ili ja repondis esperant-lingve kaj mi tute ne spertis tradukadon de la teknikaj tekstoj. Tiam mi devis trovi vortaron de komputilaj terminoj kaj tradukis por mia amiko. Finfine la trian de marto 2000 en la reto aperis babilejo

"Por Esperantistoj"! Mi senfine testis ĝin. Mi invitis miajn korespondamikojn babili tie kun mi kaj ĝuis paroladon en reala tempo. Do, unue estis babilejo nur por mi kaj miaj konatuloj. Po iomete amikoj reklamis ĝin, ligoj al ĝi aperis en multaj retpaĝoj kaj la babilejon ekvizitis mutaj esperantistoj. Ekde komenco ĝi ne estis tiom populara kiel nun kaj la enireja paĝo havis ligilon al la paĝo ke eblis elŝuti "avertan programon" (se iu eniris babilejon ĝi informis vin pri tio kaj vi povis babili).

Iom post iom la babilejo evoluis. Mi studas kaj laboras kaj havas tempon nur vespere sidi ĉe komputilo, sed mi tre volis scii kiu vizitis la babilejon kaj pri kio parolis tage (jes, ina scivolemeco verŝajne). Mia amiko facile solvis tiun mian deziron. Li ekaperigis arkivon. Ĉiuj povas uzi libere legi arkivon. Komencantoj (kaj tiuj kiuj ne kuraĝas partopreni babiliadon) uzas ĝin por vidi ekzemplojn de ĉiujtaga parolado.

Post kiam jam multaj homoj de tempo al tempo vizitis babilejon, ne restis loko por ruslingva babilado inter mi kaj Uhr —kiam ni ekparolis ruslingve kompreneble

Jen la babilejo

esperantistoj koleriĝis. Do, ekaperis privata ĉambro.

La babilejo situas ĉe karelia.ru do rapide ekhavis nomon *Karelia*\*. Kiam homoj babilas rete. ili ne vidas unu la alian - do, la plej simpla ideo - krei "galerion de babilemuloj" ekaperis en la kapo de Sencay. Ideo kreskis kaj post iom da tempo joosteto transprenis, kaj faris la nunan paĝon kaj ankaŭ moderigis babilejon. Nuntempe li kaj Miĥil teknike prizorgas babilejaron kaj dank' al iliaj programkapabloj multaj esperantistoj konatiĝis rete antaŭ realaj renkontiĝoj (aŭ eĉ trovis kunvojaĝantoj por kune veturi al iuj aranĝoj).

Krom rekta uzado de la babilejo - interpadolado, ĝi ankaŭ jam kelfoje uziĝis por reklami nian karan lingvon. Dum la unuaj prezentadoj de la lingvo, antaŭ iuj kursoj por pruvi ke la lingvo vaste uzeblas, eblas montri al interesiĝantoj realtempan komunikadon de esperantistoj el kontinentoj/landoj.

*Saluton!* - diras ĉiu kiu eniras Interligitan babilejon kaj ekkomencas babili. Estu ankaŭ vi unu el ni- *babilemuloj*!

*Julinka Litvinova*  
*REEM-komitatano pri eksteraj*  
*rilatoj, A-komitatano de TEJO*  
*(Reĝino de la Babilejo, titolo,*  
*kiun mi ricevus de la afabla*  
*franco :-)*

## *Kursoj de Esperanto de KAE-2001*

Unue ni elstaras la trian Kurson de Esperanto-2001, kiun KAE organizas en la Aŭtonoma Universitato de Barselono (Belatera), kies daŭro estas 30 horojn, kun Tri Kreditoj de libera elekto por la lernantoj, kiuj bone sukcesas, la profesoro estas samideano Martí Guerrero i Cots. La akcepto de tiu propono denove estis pozitiva: 24 lernantoj aliĝis, la estraro de KAE estas tre kontenta ĉar nia restado esperantista en tiu Universitato de Barselono plifirmigas. Ankaŭ ni gratulas la iniciaton kaj ekonomikan stimulon ricevitan de Esperanta Fonduso kaj HEF interkonsentita ek de la komenco de de tiuj kursoj.

Ankaŭ ni deziras mencii la ceterajn kursojn de la Jaro 2001-2002, organizitaj de KAE en Sabadell kun tri lernantoj (Profesoro Ramón Manau) ĉeestas 4 lernantoj en la koresponda Kurso gvidata katalune (Porf. Santiago Torné) kaj 5 lernantoj en la koresponda kurso gvidata hispane (profesoro Luis Serrano): La KAEn Delegacion de la urbo de Terasa ĉeestas 6 lernantoj (Prof. Ernest Roca) kaj la Delegacio en Hospitalet de Llobregat (Barselono) havas 16 lernantojn (prof. Martí Guerrero i Cots), ni nin gratulas pro la sukceso.

*José María Galofré Domingo,*  
*KAE Prezidanto*

\*Karelia: nomo de la respubliko de Rusio.

# La sindromo de Babel ,

## konkludoj pri socia malsano<sup>1</sup>

Ĉi tiun prelegon mi diris la 8-an de novembro de 1997 en la Kazino de Mursjo, Ĉambro Roza, okaze de la Foiro de Libro organizata de la Asocio de Librovendistoj de Mursjo. Duafoje mi diris ĝin la 24-an de junio de 2001, dum la 60-a Kongreso de la Hispana Esperanto Federacio, denove en la hispana. Ĉi tio estas la unua fojo, kiam mi prezentas ĝin en Esperanto. Se oni uzas ĝin en alia lingvo antaŭ alilingva publiko, oni nepre devas ŝanĝi la ekzemplojn en la koncernen lingvon. Bonvolu, tiukaze, sendi al mi kopion de la nacilingvigita traduko.

Dankon, gesinjoroj, pro tio, ke vi venis aŭskulti mian elparoladon pri temo, kiu influas aparte la libran mondon, kaj sekve ĝi utilas en la Kultura Semajno de la Foiro de Libro, organizita de la Profesia Asocio de Librovendistoj de Mursjo.

Kiel ni ĉiuj scias, *συνδρομη* signifas, en la greka lingvo, *konkuro*, kaj ĝi estas vorto, kiun oni uzas en kuracado por difini aron da simptomoj, kiuj karakterizas malsanon, tiel ke difinante ĉiujn ilin, oni povas difini la malsanon konsideratan. Mi estas parolonta pri la **Sindromo** —aŭ simptomaro — **de Babelo**, malsano socia klasigita inter nevrozoj de la svisa psikologo Klod Piron<sup>2</sup> (Claude Piron).

Sed, kial *de Babelo*? Ni vidu tion, kion diras pri tiu vorto la libro de libroj, tio estas, *La Biblio*.

En ĉapitro 11-a de la *Genezo*, versetoj 1-a al 9-a, oni legas:

*Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero. Kaj kiam ili ekiris de la oriento, ili trovis valon en la lando Ŝinar kaj tie ekloĝis. Kaj*

*ili diris unu al la alia: Venu, ni faru brikojn kaj ni brulpretigu ilin per fajro. Kaj la brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kaŭko. Kaj ili diris: Venu, ni konstrui al ni urbon, kaj turon kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero. Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen keion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpata en ĉio, keion ili decidis fari. Ni malleviĝu, do, kaj Ni konfuзу tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia. Kaj la Eternulo disiĝis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili cesis konstrui la urbon. Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuзis la lingvon de la tuta tero kaj de tie la Eternulo disiĝis ilin sur la supraĵon de la tuta tero.*

Tiel diras *La Biblio*, la vero absoluta por milionoj da homaj estoj. Tamen, ĉiu preĝisto dirus, ke tion oni ne devas preni litere, ĉar ĝi estas figurigita lingvaĵo, taŭga al semida menso, por kiu ĝi estis skribita origine. Ni konsideru, sekve, tiun rakonton de kvar vidpunktoj; ni vidu mallonge kvar diversajn interpretojn:

1. **Teologo:** «Dio, simboligita de Ĉielo, vokas homon al si. Sed Dio estas amo, simpleco, korinklino, kompreno, unuiĝo en respekto al diferencoj. Homo havas alvokon, kiu puŝas lin al plej alto, sed li

<sup>1</sup>Ni memoru, ke la originala hispana versio troviĝas en Interreto, adreso <http://storm.prohosting.com/jesuo/sindrome.htm> kaj angla traduko en <http://storm.prohosting.com/jesuo/babelian.htm>



ne povas realigi ĝin se ne per spirito de orgojlo aŭ rivaleco (komentistoj konsideras, ĝenerale, ke homoj volas havi ĉielon ne por vidi Dion kaj kunesti kun Li en reciproke korinklina etoso, sed por okupi Lian lokon). Se homo lasas, ke tiuj tentoj altiru lin, li perfidas sian alvokon kaj enkondukas malkondordon, ĉar Dio estas konkordo ».

2. **Marksisito:** «La Mito de Babelo vidigas forton pri unueco kaj timon, kiun pri ĝi havas tiuj, kiuj jam prenis povon kaj staras super la aliaj. La «sinjoro» reprezentas ĉi tie ekspluatantajn klasojn, kiuj tremas kiam ili vidas, ke la unuiĝo de ekspluatataj klasoj minacas provoki renverson de povo. Ĉar tio, kion ili timas estas unuiĝo, gvidantaj klasoj kreas konfuzon. Per siaj manipuladoj kaj misinformoj, ili malebligas, ke liberigaj fortoj unuiĝu. Lingvo estas parto de superstrukturo, ĝi estas armilo, tiel kiel pruvas la socia diskriminacio, kiun faras ortografio en Francio, diferencoj pri prononcado en Anglujo, uzo da lingvoj fremdaj en la mondo. Ĉu estas nur koincido tio, ke tiuj, kiuj scipovas la anglan en Hispanio neniam apartenas al –ni diru—laborista klaso, al proletararo? La biblia mito estas manipulo celanta teni produktivajn fortojn en rezignacio, sube, per minaco: se vi provas atingi la gvidantan tavolon, mi semos konfuzon en viajn vicajn, kaj vi sentos vin ridindige».
3. **Kapitalisto:** «Ĉi tiu rakonto klarigas, per mita formo, kia absurda estas voli preni homojn al paradizo sur tero, kiel komunistoj provis fari. Se oni lanĉas ambician entreprenon sen antaŭa pristudo, sen analizo pri la rilato efiko/kosto, venas la momento, kiam oni devas iri malantaŭen: miskompreno kaj malinterkonsentoj instaligās inter tiuj, kiuj investas siajn fondusojn aŭ scifarojn kaj tiuj, kiuj kredis, ke ili povas ignori

leĝojn pri realo. Ĉielo ne estas tiu plafono, kiun turo povas atingi. Sovetunio hieraŭa bildigas tiun miton: ĝi provis preni popolon al tiu morgaŭo, kiun ili kantas sen agnoski realojn homajn kaj ekonomiajn. Rezulto: la ŝtofo socia disŝiriĝis. Anoj de tiu granda lando antikva ne plu parolas la saman lingvon, kaj la konstruado haltas, en konfuzo nekredibla».

4. **Psikoanalisto:** «La Turo de Babelo? Tio rilatas al *Komplekso de Edipo...* **Erekto** da turo..., ni scias el kio tio venas. La knabo volas atingi la sepan ĉielon, kiun jam konas gepatroj. Konfuzo estas tio, kion li sentas, kiam li imagas, ke la patro kaptis lin en evidenta krimo. [...] Subite erekto de turo estas interrompita. Funde, la rakonto pri Babelo estas ligita al fantomoj pri kastro. Se oni provas elstarigi turon por atingi la plezuron de ĉielo..., zap!, «Li» *tranĉas ĝin* al ni, ĉar ni kulpas. Eble pro tio knabinoj estas pli kompetentaj pri lingvoj ol knaboj. Ili ne sentas sin rivaloj de patro danĝere pova».

Ni jam vidis el kie venas la nomo de la malsano. Nun ni proskribu ĝin. Ĝi estas socia malsano, tio estas, ne suferata de individua persono, sed de tuta socio, eĉ se ĝi konsistas nur el individuoj tute sanaj. La nutra supo por tiu malsano estas serio da eroj al kiuj ne estas fremdaj onidiro, misinformo kronika, manko da serioza debato trankvila, same kiel al kutimiĝita deleĝo pri opinio propra al tiu de *spertuloj* pli aŭ malpli *profesiaj*. Sed ni unue priskribu la simptomojn, kiujn mi pridiris antaŭe, kaj poste ni priskribos rezume la provojn flegi kaj kuraci tiun strangan malsanon socian.

**Unua simptomo:** Ne estas problemo en la hodiaŭa mondo. La komunikan problemon oni solvas per la angla.

**Dua simptomo:** traduko kaj interpreto estas efikaj. Tio justigas la elspezojn.

**Tria simptomo:** Kvankam registaroj dediĉas al Babelo milmilionajn kvantojn, kiuj povus kuraci analfabetismon aŭ sanon aŭ malsaton al siaj koncernaj popoloj, tio ne estas kritikebla, ĉar ili ne povas ne fari tion.

**Kvara Simptomo:** ne gravas la malkonveno lasi kelkajn uzi lingvon perfekte kaj samtempe malebligi, ke ĉiuj aliaj facile akiru ĝin.

**Kvina Simptomo:** lingvoj, kiujn oni lernigas en niaj lernejoj, estas lernataj perfekte, aŭ almenaŭ je nivelo pli ol sufiĉe.

**Sesa Simptomo:** ankaŭ oni povas lerni fremdajn lingvojn ekster reguligitaj lernejoj. La afero estas nur eki. Tiu, kiu ne scias la anglan, simple ne volas lerni.

**Sepa Simptomo:** lernado pri fremdaj lingvoj en niaj lernejoj portas onin en fremdan kulturon.

Same kiel multaj aliaj aliaj mensaj malsanoj, la Sindromo de Babelo implikas deliron. Anstataŭ vidi realon, socio ĝuas imagon, kiel tiuj simptomoj, kiujn mi ĵus listigis, pravas.

Se la problemon solvintus la angla, neniŭ el tiuj, kiuj ĉeestas ĉi tie nun, kiuj jam finis mezlernadon plenplenan de angla lingvo, havus problemon sekvi filmon en tiu lingvo, eĉ ĉi tiun prelegon mi povus daŭrigi en la angla, sen tio, ke iu ajn malsukcesus kompreni.

Tamen, mia travivaĵo kiel instruisto pri la angla dum dudek jaroj pruvis al mi, ke tio ne estas ekzakte kutima.

Al mi plaĉegas la angla, tiom multe, ke iam mi decidis dediĉi mian tutan vivon lernigi ĝin. Decido, kiun mi neniam bedaŭris. Se la hispana estas mia patrino, ni diru, ke la angla estas mia onklino; mia *riĉa onklino*, kiu manĝigas min, kiu alirigas min al mirinda kulturo kie kunvivas Sakespeare, Dickens, fratinoj Brönte, David Hume, the Beatles, Agatha Christie, tiuj homoj, kiuj stiras laŭ la maldekstra parto de la vojo, kaj aliflanke rilatas min al *dekstruloj*, usonanoj de la *American Way of Life*, de libereco, ekonomio merkata, de la *In God we trust*, honoro, Hollywood kaj siaj oskaroj, Dashiell Hammet, la mondo de digitalaj interkomunikadoj kaj tiom multe da aliaj profitaĵoj, kiujn mi ne povas citi pro manko da tempo.

Alidirite: **la angla igis min regato moidela de la Imperio de l' Suno Mortinta.** Kion mi diras tute sen akra aŭ cinikisma sento. Sed la plej baza etiko ne permesus al mi mensogi al mi aŭ al aliaj. Se tiu metafora onklino de mi ĵus citita, kaj kiun tiom multe profitas mi, ne estas bela, aŭ agas malbone, estus fie, ke mi klopodus konvinki iun pri la malo.

Mi nur diros, ke lernantoj, kiuj finas bakalaŭron en nia lando kaj ne faris kurson en Usono aŭ Anglio, ĝenerale estas tre for de tio, ke ili povas komposti prelegon aŭ skribaĵon kompreneblajn en la angla. Same okazas en Francio, Italio kaj aliaj eŭropaj landoj, escepte nur de Germanio, Nederlando kaj Skandinavio. La kialo kuŝas ĉefe en tio, ke lingve tiuj popoloj estas tre proksime al Anglio. Se en niaj lernejoj oni instruus la italan aŭ la portugalan dum tiuj sep jaroj, certe plej parto da niaj lernantoj, kiuj nek estas pli turpaj, nek estas helpataj de instruistoj pli senutilaj ol tiuj de

aliaj landoj, povus ja verki escojn aŭ havi debatojn per tiu dua lingvo lernita en sia alta lernado. Ni pensu pri tiam, kiam la franca estis la dua lingvo por ĉiuj hispanoj, antaŭ ne tiom multe da jaroj (ne pli ol 20 en mia urbo, Mursjo): tiu lingva kompenteco akirita de lernantoj per metodoj multe pli malĝisdatitaj kaj malpli efikaj ol tiuj nunaj, estis pli bona ol nun, kiel pruvas per si mem la ekzisto de parto orala en tiuj ekzamenoj nomitaj *de matureco* por eniri la Universitaton, anstataŭigitaj nun de ekzamenoj *de selekteco*, pli senkvaligitaj... Ne, la kialon por tiu perdo de kompetenteco lingva ĉe niaj bakalaŭritoj oni devas serĉi je la angla mem.

Ni konsideru la sekvantajn flankojn:

1. **Aĵaĉaro da esprimoj malmulte klaraj.** Verkisto George Steiner diris pri siaj lernantoj fremdaj, kiuj jam atingis evidentan region de la angla: *so much that is being said is correct, so little is right* (tiom multe oni diras korekte, tiom malmulte estas taŭga). Al denaskaj angloparolantoj, la angla de fremduloj kapablaj ŝajnas snoba, malriĉa, artefarita kaj komplika, ĉar tie, kie fremduloj diras longan kaj kulturajn vortojn, ili uzas amason da unusilabojn. Tiel, anstataŭ *despise* (malestimi), angloj diras *look down on*; anstataŭ *to occasion* (okazigi), ili preferas *to bring about*; anstataŭ *let him say everything he wants* (li diru ĉion, kion li volas), ili diras *let's hear him out*; anstataŭ *compensate* (kompensi), denaskuloj de la angla diras *make up for*; anstataŭ *I'll have to tolerate his presence* (mi devos elteni lian ĉeston), ili preferas diri *I'll have to put up with him*. Sed *make up*, krom kompensi, ankaŭ povas signifi *preni decidon*, kiel en la frazo *he's made up his mind to stay in* (li decidis resti interne), kaj ĝi ankaŭ povas signifi uzi ŝminkon (*I've made up my face to go out*: mi ŝminkis por promeni). Ne estas ekzakte tio la problemo pri polisemio, ĉar ne temas

pri unu nura vorto tiu, kiu havas kelkajn signifojn, sed tuta aro da vortoj.

2. **Senlima vortaro.** En la hispana, kaj ĝenerale en eŭropaj lingvoj, ni estas pli ekonomiaj pri la nombro da vortoj, kiujn ni uzas loke. En nia lingvo la vorto *grande* esprimas ideon, kiun la angla ĉirkaŭbrakas per la vortoj *big, large, tall, great, grand, important...* Tio venas de tio, ke la vorta fonto de la angla originas en la ĝermana kaj la romiana. Tio kaŭzis parojn da vortoj, kiujn oni uzas tie, kie ni uzas nur unu. *Oriento*, kun geografia signifo, malsamas ĉu laŭ tio, ke ni referas al Eŭropo (*Eastern Europe*), ĉu laŭ al Afriko (*East Africa*). Konfuzi ilin signifas, ke ni estas fremdaj al la angla. Same okazas pri *inevitable/unavoidable, brotherly/fraternal, liberty/freedom, buy/purchase, read/peruse, eastern/oriental, beef/cow*. Alia ekzemplo: el dento venas denta kaj dentisto. En la angla la origina vorto estas *tooth* (kies pluralon neregulan, *teeth*, ni ne pritraktas nun), sed la fakisto pri dentoj ne estas *toothist*, sed *dentist*: tio estas, ni havas du vortojn tie, kie en aliaj lingvoj estas nur unu kaj derivito. Japano ankaŭ venigas el *ha* (dento) kaj *isha* (kuracisto) la vorton *jaisha* (dentisto), kaj trovas same malbonguste, ke oni trudas al li en lernejo lingvon, kiu postulas al li malŝparon tiom grandan pri memoro.

3. **Delikata fonetiko.** La angla similas pli kaj pli al tiu lingvo de malnovaj egiptanoj, kiun oni skribis per maniero, kiu ne rilatis al tio, kion oni prononcis. En ĉiu eŭropa lingvo oni scias kiel sonos vorton nekonatan, kiam oni vidas ĝin unuafoje korekte skribitan. Tamen, fonetike nenio malsimiligas vortojn *beet* (beto) kaj *beat* (frapo), nur tiu dua a ŭ

e. Malmultaj fremduloj senfakaj scipovas prononci aŭ kompreni la diferencon sonan inter *ship* (ŝipo) kaj *sheep* (ŝafo), ĉefe kiam oni parolas rapide. Ne lacigi vin, mi diros nur, ke en la angla oni prononcas dekdu vokalojn malsamajn tie, kie aliaj popoloj uzas nur kvin. Kaj gravas, ke la angloj skribas tiujn dekdu vokalojn per nur kvin literoj, same kiel ni. Tiel, okazas, ke *e* sonas **e** en *bed*, *get* kaj *sell*, sed *ĝi* sonas *i* en *evening*, *complete* kaj *cinema*; la *u* sonas **a** en *sun*, **iu** en *useful* kaj **u** en *bull*. Kaj tio okazas en regula angla. Sed abundas dialektaj formoj, laŭleĝe uzataj de denaskuloj de anglalingvaj landoj, kie oni povas dediĉi al ni frazojn kiel '*m gonna say no nothing*, kiuj pravigas Henry Higgins, kiam li demandis al si *Why can't the English talk proper English?* (kial la angloj ne povas paroli bonan anglan?)

4. **Senatenditaj uzoj de la angla.** Jen juna diplomito pri modernaj lingvoj de eŭropa universitato, kiu gajnis postenon kiel interpretiston en Unuiĝintaj Nacioj, kiu, kiel ni ĉiuj scias, sidas en Novjorko. Nia junulo fiere promenas al aŭtobusejo, kaj tie li zorge vidas averton, kiu diras *No standing* (ne staru, laŭ lia kono). Sed li vidas neniun benkon apude, kaj li supozas, ke oni ne esperas de li, ke li sidu surplanke. Do, li promenas laŭ la aŭtobusejo ĝis la buso alvenas. Poste oni ridete klarigas al li, ke en Usono *No standing* signifas **No parking** (Ne parkumu). Sed pli tragike estas la afero por tiu japana junulo 16jaraĝa, kiu vojaĝas al Usono okaze de fino de sia mezlernejaj studoj, kaj kiun gvardisto konfuzas. Li krias *Freeze!*, kaj la knabo, kiu ne scias

kial sinjoro deziras, ke li glaciigu, daŭrigas sian vojon..., ĝis la gvarda klugo detruas lian koron. Ĉar en Usono **Freeze!** signifas *haltu aŭ mi pafas*.

5. **Vapora gramatiko.** En la angla ne estas ĝenro aŭ nombro adjektivaj, kaj tio estas dankinde kiam ni studas ĝin, ĉefe, se oni komparas tion kun malagrablaj fleksioj de la germana aŭ la rusa. Sed poste oni parolas al ni pri *Our English Teacher*, kaj ni ne scias, ĉu oni parolas al ni pri instruisto pri la angla, kiu naskiĝis en Hispanio, aŭ instruisto, kiu naskiĝis en Anglio kaj instruas ion ajn... Pli zorgiga estas tio, kio okazas kiam kuracisto ordonas nin fari *short breathing exercises*, kaj ni ne scias ĉu li volas, ke ni faru **ekzercojn mallongajn** pri inspiro, aŭ ekzercojn pri **inspiro mallonga**. Angloj certe scias el konteksto, sed ili estas denaskaj. Ni ankaŭ estas denaskaj, sed de alia kulturo, pri kiu ni devas fieri. Ne solvas la babelan problemon angloj, ne.

*Sed novaj teknologioj igas nin* –kelkaj amikoj miaj diras– *lerni la anglan. Se ni scipovas la anglan, ni komprenos komputilojn pli bone, kaj ni laboros per ili pli efike.* Kompreni kiel funkcias komputiloj vere signifas kompreni *kodon maŝinan*, tio estas, lingvon de nuloj kaj unuoj, kaj ne la anglan. Kaj ankaŭ tiu lingvo estas nur rimedo por kompreni dugradajn variaĵojn de magneta kampo surigita en malgrandajn pecojn da fero, kiu estas en diskoj... Sed ni sekvu tiun vojon, ni supozu, ke tio estas vere, ke utilas, ke ni lernu tiujn *komandojn* aŭ *rezervitajn vortojn*, kiujn komputiloj uzas, ekzemple en programaj lingvoj. Kaj ni prenu tiun lingvon, kiu havas

plejon da ili, lingvo BASIC. Se ni prenas bonan manlibron pri *bejsik*, ni vidos, ke ne estas pli ol okdek. Ni duobligu tiun ciferon, kaj ni vidos, ke ankoraŭ mankas 2740 por atingi la supozitajn 3000, kiujn fakistoj diras, ke ili sufiĉas por havi konversacion ĝeneraltipan kun iu ajn en la angla. Tiuj *bejsikaj* vortoj estas tiaj, kiaj **print, screen, put, list, rem**, kaj tiel plu, kiuj havas tre koncizajn tradukojn en aliajn lingvojn.

Sed tion oni bildigas pli bone per poemeto, kiun mi kuraĝos legi al vi. La aŭtorino estas Anita Raskin, kaj mi prenis ĝin de libro *Antenoj de televido kaj F.M.* (Daniel Santano León: Antenas de televisión y F.M. Madrid 1962, E. Parainfo):

I remember, I remember,  
In the dear old days gone by,  
When a screen was meant to hinder  
The intrusion of a fly;

I remember when antennas  
Were the things we used to see  
Waving gently from the forehead  
Of a butterfly or bee;

And I recollect when people  
Spoke of snow, and likely meant  
Little flakelets, wet and chilly,  
Swirling Whitely in descent.

I remember, I remember  
What those words once meant to me,  
Ah! Those dear old definitions  
In the days before TV!

[Mi memoras, memoras  
Je karaj malnovaj tagoj forigitaj  
Kiam ekrano supozeble malfaciligis  
Invadon muŝan;

Mi memoras kiam antenoj  
Estis tio, kion ni kutimis vidi  
Tremi dolĉe sur frunto  
De papilio aŭ abelo;

Kaj venas al mia memoro, ke oni  
Parolis pri neĝo signifante  
Eretojn malsekajn kaj malvarmetajn  
Kiuj cirkligis malsupren.

Mi memoras, memoras  
Tion, kion tiaj vortoj iam signifas al mi  
Ho, tiuj malnovaj karaj difinoj  
de antaŭtelevidaj tagoj!]

Sed se ni ne povas aŭ volas lerni la anglan je nivelo sufiĉe bona por interkompreni korekte kun fremduloj, estas alia solvo: ni fidu tiun funkcion al *interistoj profesiaj*, kiujn oni nomas *interpretistoj* aŭ *tradukistoj*. Oni preferas uzi la unuan vorton por tiuj, kiuj transigas ideojn de unu al alia lingvo ĵus tiam, kiam ili aŭdas ilin, kaj la duan vorton oni uzas por referi al tiuj, kiuj tradukas skribe, kun pli da tempo, komforto kaj la ebleco konsulti vortarojn fakajan kaj specialismajn verkojn pri la temo de la teksto tradukata. Interpretistoj rolas heroan laboron, por kiu ne ĉiuj estas ebligataj fari, ĉar oni devas aŭdi unu lingvon kaj samtempe paroli alian. Tio postulas apartajn kvalitojn, grandan memoron kaj sinsekvajn mensan flekseblecon, sen malaltiĝojn, dum la tuta tempo, kiu daŭras la konferenco, prelego aŭ intervjuo por kiu oni kontraktis lin aŭ ŝin. Tio, evidente, havas koston. Kaj tiun koston oni mezuras po miloj da dolaroj. Profesoro Piron', psikologo, poligloto, iam instruisto pri lingvoj kaj tradukisto en Unuiĝintaj Nacioj kaj Monda Sano-Organizo, kiu trairis la kvin kontinentojn en sia laboro kiel interpretisto en diversaj konferencoj de tiuj organismoj, kaj psikoterapiisto kaj instruisto de la Fakultato de Psikologio kaj Sciencoj pri Edukado en la Universitato de Ĝenevo, Svislando, diras, ke en 1991 interpretisto

gajnis pli ol \$500 tage en plurlingva konferenco. Eŭropa unio dungas regule pli ol 570 interpretistojn kaj pli ol 2 500 partotempajn. En 1989 ili dediĉis al interpretado kaj tradukado pli ol 1 400 milionojn da ECUS, (tio estas, 1 400 milionojn da eŭroj), kaj tiu ĉi cifero kreskas poĵare, kaj estas pagata de vi kaj mi.

Tradukistoj, aliflanke, ankaŭ ne estas malbone pagataj. Po vorto tradukita oni pagas 36 centojn da dolaro, proksimume 0,3 eŭron. Oni multobligu per la tri milionoj sescent mil vortoj, kiujn oni tradukas ĉiun tagon, kaj ni atingos la teruran konkludon, ke la Eŭropa Komunumo elspezas ĉiun tagon pli ol miliono da eŭroj nur en tio, ke ĝiaj reprezentantoj komprenas unu la aliajn. En tio ni eŭropanoj elspezas nian monon. Kaj ni ne povas eviti kompari tiun elspezon kun aliaj elspezoj pli modestaj. Ekzemple, kiom kostas subteni monate 70 infanojn forlasitajn en Vietnamio: 630 eŭrojn kaj duonon, tio estas, 1 200 vortoj tradukitaj, tio estas, du paĝoj. La batalo kontraŭ sennutriĝo kostas nur \$10 jare po infano: 27 vortoj de dokumento de la Eŭropa Unio. Dum Eŭropa Unio kaj Unuiĝintaj Nacioj investas tiajn kvantojn je interkompreno, paroli kaj fari malmulte, mankas mono fari aferojn tiajn: **cent milionoj** da infanoj **neniam** iras al **lernejo**; **ducent milionoj** iras **malmulte** da fojoj, **mil milionoj** da homoj **ne** havas **sanigajn zorgojn**, mil sepecent kvindek milionoj **ne** havas **trinkeblan akvon**, unu **po kvin** homoj vivas en **absoluta mizero**... Sed estas tiuj, kiuj defendas, ke registaroj ne povas fari aliel, ke servoj pri traduko kaj interpretado estas **efikaj** kaj **solvas problemojn**.

Ĉe Organizo de Unuiĝintaj Nacioj oni provis miksitajn metodojn, kiu funkcias tiel malbone, kiel tiu de Eŭropa Unio, sed kiu estas pli maljusta, malgraŭ ĝi estas pli malmultekosta: je la OUN estas reprezentitaj pli ol tri mil lingvoj, sed interpretadon oni

faras en ses: la anglan, francan, rusan, hispanan, araban kaj ĉinan. Sed multajn laborsesiojn oni faras nur en la angla kaj en la franca pro materia neebleco. Tio signifas, ke nur la reprezentantoj de ses lingvoj —en la plej bona kazo (du en la malplej bona)— povas *ludi hejme*.

Ni imagu, ke oni devigas ludi tenison al homo kiu havas manon ligita al sia dorso kaj kiu kiu havas rakedon pezan, kontraŭ bonan ludanton, kiu uzas sian dumvivan rakedon, kiu estas pli fleksebla, kaj kiu ludas tenison de sia infaneco. Komprenoble, la publiko ne konsentus pri tio, kaj forlasus la ludejon, indignite. Tamen, tio okazas en la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj ĉiun tagon, kie oni solvas problemojn gravajn, kiuj influas mondan pacon. Vietnamoj, koreoj, kenianoj, ukrainianoj..., ili ĉiuj devas fidi la bonvolon de eŭropanoj, kvankam ne ĉiam ili komprenas bone unu la aliajn en diskutoj. Evidente, **paco monda gravas malpli ol ludo de teniso**.

Tio, kion bezonas loĝantoj de globala vilaĝo por interkompreni unu la aliajn de unu al aliaj kvartaloj en tiu malkreskiĝanta mondo, ne estas la lingvo de la plej forta kaj pova najbaro. Ĉiu lingvo nacia enhavas kulturon, filozofion pri vivo, ideologion, sintenon al aliaj homoj. Por tio, ke ni ĉiuj interkomprenu, kion ni bezonas estas neŭtrala lingvo. Sed estas aliaj konsideroj.

Ni havas magian vorton, *dankon*, kiun ni ne uzas tiom ofte kiel dece. Per si mem, ĝi estas tuta frazo, kiun ni povus pligrandigi, sed ne per tio ni donus pli da signifo al ĝi: *mi dankas al vi*, aŭ *mi dankas multe*. En la angla oni diras *mi dankas vin*. En la hispana oni diras *dankojn*, en la germana, *mi dankas al vi*, en la franca, *mi vin dankas*. Vere, tiuj kvar formoj signifas same, kaj el vidpunkto strikte komunika, devus esti sengrave kiun ajn oni uzas. Sed tiam ni kolizias kontraŭ mitoj, antaŭjuĝoj kaj simpligoj, kiuj



malebligas kompreni kiel aferoj okazas en realo.

Ni prenu ekzemplon kontraŭ normo en la hispana, kiu helpos bildigi tion, kion mi celas diri: hispanaj verboj estas konjugataj laŭ tri diversaj modeloj, sed celante pli grandan klarecon, ni diru, ke estas nur unu por ĉiuj verboj, same kiel en la angla. Ni elektu la duan konjugacion. Ni konjugaci la verbon *ser*: *yo sero, tú seres, él sere, nosotros sere-mos, vosotros seréis, ellos seren*. Ni prenu la verbon *To Be* en la angla: *I be, you be, he be, we be, you be, they be*; aŭ en la franca: *Je suis, tu suisses, il suise, nous suisoms, vous suisez, ils suisent*.

Niaj oreloj *krias*, ĉu ne? Tio okazas ĉar tuta nia tradicio, respekto al niaj prauloj, marteligita de niaj instruistoj kiam ni estis infanoj per *oni diras...*, aŭ *tiel oni ne diras*, pro tiu supera kaŭzo: *ĉar tiel estas*. Tia tradicio tertremis en nia menso konscie-nekonscie, laŭ la ekzemplo kaj denaska lingvo.

Sed estas lingvo, kie ĉi tiu formo ne skuas la orelojn, ĉar ĝi estas la korekta maniero: *mi estas, vi estas, li estas, ŝi estas, ĝi estas, ni estas, vi estas, ili estas*. Se oni scias, ke *mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili*, estas la personaj pronomoj, kaj *esti* estas la verbo *esti*, vi jam scias kiel konjugacii la prezenton de ĉiu verbo en Esperanto. Interkrampe, *mi marŝis* signifas **anduve**, kaj *mi naĝis* signifas **nadé**. Nun vi ankaŭ scias formi la pasinton de ĉiu verbo en Esperanto. Esperanto kombinas la plej bonon de la angla —simpligitan gramatikon— kaj la plej bonon de la hispana —ĝian fonetikan prononcon—, sed plibonigante ambaŭ kvalitojn, ĉar ekzistas nek la esceptoj de la angla, nek la duobligoj de la hispana, kiel **b** kaj la **v**, aŭ **z-c**, **c-k**, **k-q**, kaj ankaŭ ĝi ne havas senonajn literojn, kiel **h** en la hispana aŭ fina **e** en la angla kaj en la franca. En la hispana fremduloj kaj infanoj emas fari erarojn, kiel diri *periodera* anstataŭ *periodista*, erarigite de la koincido

de *escadera, costurera, camarera* kaj aliaj. En Esperanto ni havas *jurnalistino, fiŝistino, kudristino, servistino*, kaj tiel plu.

Sed multaj homoj reagas ĝenate kontraŭ Esperanto, ĉar ŝajnas al ili, ke pli granda komunikigo ol en sia propra denaska lingvo estas kvazaŭ atenco al la plej intimo de sia persono. Tio estas alia trajto de la **Sindromo de Babel**<sup>?</sup>, kiu enkadrigas ĝin inter *nevrozoj*. Nevrozulo reagas perforte antaŭ vortoj *ŝlosilaj*, aŭ, kiel ni jam diris, *rezervitaj vortoj*. Ni vidu ekzemplon eltiritan de la libro *Foreign Language Annals* (jarlibroj de fremda lingvo), de M. D. Arabaiza:

*Lingvo, kiel amo kaj animo, estas viva kaj homa, tiom malfacile pridiĝi, ĝi estas produkto natura de spirito de raso, ne de unika homo... Lingvoj artefaritaj estas nauzigaj kaj groteskaj, kiel homoj kiuj havas kruojn aŭ brakojn metalajn aŭ kiuj havas ritmoregulilon kudritan al siaj korpoj. Doktoro Zamenhof, same kiel Doktoro Frankenstein, kreis monstrojn faritan de pecoj vivantaj, kaj, kiel Mary Shelley provis diri al ni, nenio bona povas veni de tio.*

Misrigardante la mankon de respekto S-ro Arabaiza havas pri tiuj homoj malfeliĉaj, kiuj ne elektis perdi ekstremajn per akcidento, aŭ al tiuj, kiuj pro malsano bezonas ritmoregulilon, estas notinde lia timo kaj blindeco. Li neniam konsideras la serion de problemoj, kiujn tia lingvo povus solvi, la literaturon, kiu ekzistas en ĝi kaj la amikojn kaj personajn rilatojn, kiujn ĝi ebligas, kaj ankaŭ tion, ke ĝi ebligas la konon de fremdaj literaturoj. Li simple diras, ke ĝi estas la timigulo de infanaj rakontoj, kontraŭ kiu oni devas sinprotekti. Li ankaŭ falas en tiun mensogon, ke *lingvoj vere estas vivantaj estaĵoj*, troigante la simplan analogion, kiun lingvistoj uzas por klarigi kelkajn fenomenojn. Tamen, lingvo estas nenio pli ol konvencio pri sonoj al kiuj arbitre oni donas signifon. Se lingvoj tiel nomitaj *naturaj* havus, en siaj leksikoj, iun ajn kontakton kun realo, kun tiuj objektoj, kiujn

ili nomas, vortoj koincidus en ĉiu lingvo de la mondo. Sed okazas, ke eĉ onomatopeoj ne koincidas, ĉar kokoj diras **kikiriki'**, **kokegiko'** aŭ **dudldudldu'** laŭ tio, ke aŭdas ilin hispano, franco aŭ anglo.

Estus longdaŭre pridiri ĉi tie la objetojn, kiujn oni diris kontraŭ Esperanto<sup>1</sup> en sia pli ol jarcenta vivo, kaj ni ne havas sufiĉe da tempo. Eblas, ke nun vi diru kelkajn el ili al mi, kvankam ĉi tiu prelego ne celas konvinki adopti Esperanton, sed rimarkigi la ekziston de sociala malsano, kiun oni devas kuraci ne individue, sed socie. Kaj tion oni povas fari, laŭ mia opinio, per rezonita kaj trankvila debato.

Sed same kiel antaŭe mi deklamis anglan poemon, plaĉus al mi nun deklami alian en Esperanto por tio, ke vi povu juĝi ĉu lingvo Esperanto estas pli *nenatura* (konsiderate, ke *artefaritaj* estas ĉiuj lingvoj) ol la angla. La poemo nomiĝas *Al la Juda Foririnto*, kaj la aŭtoro estas nederlanda laboristo Leen Deij:

AL LA JUDA FORIRINTO

Li fermis la kofron, manpremis — adiaŭ!

Sen ia protesto li iris...

Hodiaŭ mi tion komprenas; li povis nur

miri,

ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Kun kapo klinita la kofron li portis.

Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis

sen ia protesto...

li povis nur miri, ke mi, la kristano, lin

lasis foriri.

Kaj iam la filo, kun filo parolos,

kaj tiu demandas, la veron li volos

La mia silentos..., kaj provos nur miri,

ke mi, la kristano, lin lasis foriri.

Ni sentis kompaton, kaj monon kolektis,  
dum kelkaj el ni la infanojn protektis.

Sed Auschwitz ekzistis! Nu, kion plu  
diri?

ke mi kaj ke vi..., ni lin lasis foriri.

Leen Deij

(Holanda)

Laste, ne plaĉus al mi fini mian prelegon sen legi kelkajn pensojn de naŭdeklarjara esperantisto, Raimundo Laval, por tio, ke vi eltiru viajn proprajn konkludojn:

## Vi diris: utopio?

Tuj intelektuloj asertas kun memfido, ke komuna homa lingvo estas utopio. Ĉar -ili diras—*ĉiu popolo havas apartan spiriton, kiu estas esprimata per ĝia propra nacia lingvo. Tial, inter homoj de diversaj nacioj kaj lingvoj, era komuniko ne estas ebla.* Laŭ ili, por ekzemplo la penso de orientaziano estas tute nepenetrebla al okcidentano kaj reciproke: do kiel ili povus kompreni unu la alian? Eĉ uzante samajn vortojn, ili nepre interpretas ilin diference.

Aŭdinte tiujn pezajn argumentojn, mi ekridas; kaj mi relegas leterojn de ekstreorientaj korespondantoj, aŭ libron de Miyamoto Masao, aŭ paĝon de la revuo *El Popola Ĉinio*; mi rememoras fluaĵn interparoladojn kun esperantistoj el Ĉinio, Japanio, Indonezio. Uzante nian komunan interrilatilon, neniam mi spertis ian malfacilon en interkomprenado. Mi konstatas, ke la pensoj kaj sentoj esas same esprimataj, eĉ se iafoje estas uzataj bildoj kaj metaforoj malsamaj, sed senpere kompreneblaj. La ploroj de japana virino, kiu perdis sian filon en Pacifika milito aŭ sub la Hiroŝima bombo estos similaj al tiuj de usona patrino, kies infano estas buĉita en la borbardado de Dresdno aŭ de Hamburgo. Sama feliĉa rideto floras sur la lipoj de junaj geamantoj en Pekino aŭ en Moskvo. Ĉe ĉiuj latitudoj kaj longitudoj la cerbo same funkcias en ĉiu homa kapo, kaj la koro same batas en ĉiu homa brusto. Ĉie la korpo kaj ani-

<sup>1</sup>Kelkajn, ĉirkaŭ 30, ni jam diskutis en n<sup>o</sup> 30<sup>a</sup> al 39<sup>a</sup> de *Kajeroj el la Sudo*.

mo same reagis al suferoj kaj ĝojoj, kaj eltrovas samajn vortojn por esprimi siajn sentojn kaj pensojn.

Ni ne lasu nin forlogi de sofismaj teorioj. Al ili ni trankvile kontraŭmetu nian praktikan sperton.

Vi diras: utopio, neebleco? Ni pravas la movadon marŝante.

*Vala*

Kaj provi tiun movadon, mi invitas vin okulumi la librojn en Esperanto, kiujn mi portis, post kiam mi respondis la demandojn, kiujn vi volonte faros. Mi diris<sup>1</sup>.

*Jesuo de las Heras*



<sup>1</sup>Mi dankas profesoron Claude Piron pro multaj ideoj dum la pretigo de la prelego, kies originalon hispanan li legis kaj enkuraĝis. Plian informon pri tiu afero oni trovas en lia libro *Le défi des langues*, Harmattan, 1994.

Venas de paĝo 23<sup>a</sup>

de la Tria Mondo fare de Riĉlandaro. Tio, laŭ mi, estas neigo de rajto al libera propono ene de SAT, kaj pro tio mi ekŝiĝis la asocion. Se SAT estus sekto, mi tial herezumiĝus, kompreneble...

Kaj ni venu al la kerno de la problemo: mi estas *ĉiopova* redaktoro de bulteno de asocio rilatanta al SAT per Konvencio de Gotemburgo. Pro tio, ne taŭgas, ke mi *ataku* SATon en ĝiaj paĝoj, sed en tiuj de *Laŭte!*, *Sennaciulo*, aŭ alia pli *neŭtrala* publikaĵo. Mi konsideras, ke *Kajeroj el la Sudo* estas sufiĉe matura magazino nun, kaj ke oni rajtas diri veron kaj liberan opinion ĉi tie, eĉ la redaktoro, kondiĉe ke ĝi *ne mistraktas iun ajn personon*. Mi, evidente, faris escepton al tio publikigante la *Akran reagon* de Ĵakvo Ŝram, ĉar mi kredas, ke estas pli grave aserti la rajton libere sinesprimi kaj kritiki ĉion, kion oni kredas, ke estas maljusta. Tion farante ja okazos eraroj, kaj certe eblas, ke oni kritikis senprave homojn, aŭ — ĉikaze — asociojn, sed jen valoro de liberaj debato kaj diskuto. Se tio ŝajnas *perfido* al *fratoj* de sama *kredo*, mi des pli ĝojas, ke mi ne plu estas en tia *kongregacio*. Mi, tamen sendas kopion al cititaj magazinojn celante publikigon.

*Jesuo*

## Denove *Naturista vivo*.

*Naturista vivo*, oficiala organo de INOE, pliboniĝas. La lasta numero, la 63-a, surpizas min kaj aliajn legantojn per koloraj fotoj.

La revuo enhavas bonajn artikolojn, kiel *Naturismo en Australio* aŭ la jura situacio de naturismo en Francio, aŭ la klubo Helios, artikolo verkita de Vladimir Solutzev, estro de la klubo Helios.

La lasta artikolo estas *Postparolo de la redaktoro* kaj rakontas, ke la jarlibro informas pri 250 membroj de INOE, kaj fakte laŭ la iamaj adresaroj ni havas pli ol 500 membrojn, eĉ la presejo men produktas pli ol 200 ekzemplerojn sed en la aktuala dissendolisto estas nur 135 adresoj, kaj inter ili estas pluraj, kiuj ricevas la revuon donace sed la plej grava problemo estas tamen ke ĝis la hodiaŭa tago nur malpli ol la duono de nia membraro - nur 50 membroj - pagis siajn kotizojn por la jaro 2001. Se la kotizoj alvenus rapide, la apero de la revuo fincance estus stabila.

Jozefo Németh<sup>1</sup>, el Hungario, kaj redaktoro de *Naturista Vivo* skribas pri la problemo, ne de INOE, sed pri la problemo de preskaŭ ĉiu organizaĵo kiu laboras per kaj por Esperanto.

Hale publikigas *Kajeroj el la Sudo* kaj havas la saman problemon, sed en HALE 8531 Ihász, Fő u. 41/5 Hungario, jozefo@nl-papa.hu.

estas alia ebleco: oni povas legi la revuon senpage, en interreto.

Aliflanke, la volontuloj de HALE pagas, preskaŭ romantike, ĉar ili volas la paperan version.

Mi ne scias tian, kia estas la solvo de la problemo, kvankam mi scias ke kiam en miaj manoj mi havas la revuojn, mi estas feliĉa viro kaj pro tio mi pagas la kotizon.

Mi kunhavas la saman idealon kaj la kotizon de INOE, same kiel la kotizo de HALE, ne estas altaj kotizoj. Ni devas trovi rimedojn kiel akcepti anoncetojn ne esperantistajn en nian revuon, aŭ fari fonduson por kapitaligi la organizaĵojn.

*Johano Antono, Prezidanto de Hale kaj membro de Inoe.*



©Leif Heilberg, de *Naturista Vivo*

Rosanne kaj Lila ĝuas sunon, brizon kaj Esperanton en havaja marbordo.

Represa per aparta permeso de *Naturista Vivo*

## Akra reago

*Antaŭ kelkaj semajnoj mi ricevis ĉi tiun leteron per Interreto, reage al mia artikolo Tra Eŭropo per Esperanto:*

Al Jesuo,

Evidente mi legis la lastan numeron de la revuo de HALE «Kajeroj de la Suno», kies redaktanto vi estas. Mi ege bedaŭras ke vi kiel redaktanto misuzas vian povon por kritiki SATon en revuo de asocio kiu havas amikan rilaton kaj eĉ estas ligita al SAT.

Se vi eksplikis vian miskomprenon, kiun vi havis dum la SAT-kongreso en alia revuo, kiel ekzemple **Laute!** aŭ **Sennaciulo**, mi certe ne havus problemojn pri tio. Sed ke vi misuzas vian potencon, kiel redaktanto de labo-

rista revuo, kritiki kun nura celo pravigi vian malmembrigon al SAT, ne, tio estas por mi ne akceptebla.

Vi malebligas aliajn homojn reagi al via teksto ĉar post via mensoga informo neniu plu kuraĝas sendi tekston al vi. Ĉar mi mem ĉeestis al via decido malmembrigi, mi almenaŭ volis reagi. Bedaŭrinde via manipulado de la vero

decidigis min silenti pri la afero almenaŭ kiel oficiala reago al vi teksto.

Vi mem scias, ĉar mi ja konsideras vin inteligenta persono, ke la tuta afero ne rilatis al demokrateco sed tutsimple ke vi, pro via bruo, laŭtparolado kaj ĝena interrompo de la debatoj, mem ne plu komprenis pri kio temis. Vi nur volis altrudi al la kongreso vian opinionon, sen respekto —al parolvico kaj kiu estas multe pli grava— al ideoj kaj opinioj de aliaj SAT-anoj. Kiam vi pensas ke demokratio estas tio, kion vi montris dum SAT-Kongreso mi preferas vivi ekster via demokrateco.

Vi demandis al mi dum SAT kongreso, ĉu vi rajtas esti faŝisto kaj mi respondis jes. Do tio signifas demokrateco ke oni respektu la ideojn de aliaj eĉ kiam via idearo ne plaĉas al mi, ĉar faŝismo estas por mi

malhumana ideologio, ne kiel vi faris brue interrompi aliajn homojn. Ĉiu SAT-ano montris tre grandan toleremon kiam vi interrompis la bonan ordon de la Kongreso. Vi preferis, pro maleblo kompreni tion, pri kio ni debatis, forlasi SATon. Ke vi nun kritikas SATon en revuo de asocio ligita al SAT montras ke vi daŭre klopodas manipuli la ideojn malantaŭ SAT.



Por mi vi, per via teksto en «Kajero» (kiel dirite ne via revuo sed la revuo de la Hispanaj k-doj de HALE, asocio ligita al SAT per la Gotenburga konvencio. Vidu paĝon n-ro 10an sub teksto de la Konvencio) montras vian malhonestecon kaj manipulado de faktoj tute malsame ol vi priskribis. En SAT la k-doj estas ege toleremaj sed ĉ tion vi klare ne komprenas.

Mi sendas la mesaĝon kontrole al Marteno Bustin kaj al la sekretario de la Plenum Komitato de SAT kun aldono ke mia mesaĝo al vi estas mesaĝo de SAT-membro kiu protestas kontraŭ viaj d e m a g o g i a j

Ĵakvo  
defendas  
siajn  
tezojn  
en  
Nagykaniŝa



*Adiaŭ, peseto,  
adiaŭ!*

Arĝentis via naskiĝo,  
blondis juneco via,  
kaj nun eŭro vin forprenas  
kaj lente, sendanke  
senŝanĝa vi mortas

Ve, kia konfuzo  
pro morto via!

*Lupe Sanz-Bueno*



## Kio estas SAT?

Artikoloj tiaj, kia tiu de Jakvo Ŝram maltrankviliĝas min. Ne pro tio, ke ĝi atakas min —mia memkonvinko pri mia fienco protektas min de tio, ke akraj kritikoj tuŝu min—, sed pro tio, ke ĝi estas pinto de tio, kio kuŝas sube.

Kion mi diris, dekomence, en mia artikolo **Tra Eŭropo per Esperanto** rilate al SAT? Mi klarigis pri tio, kio okazis, kaj tio estas nerifutebla de ĉeestantoj, se ili estas pli objektivaj ol mia ekskamarado Ĵakvo, kaj ankaŭ mi aldonis komenton (rifuteblan, kompeneble), pri mia opinio pri SAT:

*Mi esperis tro de SAT. S de sennacieca ne estis videbla de mi. Oni klarigis al mi, ke sennacieca kaj sennaciisma ne estas same. SAT estas la unua, sed nur aparta fako de SAT estas la dua. Tio ŝajnis al mi ebriiĝo pri vortoj. Sennacieca estas kategorio pri la ideo ne havi nacion. Sennaciismo estas doktrino, skolo aŭ manio pri la unua. [...] Krome, A de Asocio, tio estas, korpo formata de anoj samrajtaj. T de tutmonda. Tamen, la etoso, kiun mi renkontis en Nagykanisa estis plenplene eŭropa, eĉ se estis malagasa kaj mongola virinoj tie.*

Mi konsideras danĝere, ke oni **ne povas kritiki** SATon, ĉar tio samrangigas tiun laboristan asocion al Patrio, patrino, aŭ religio. Kion ajn okazu, ne tuŝu ĝin! Se ĝin oni faras, oni estas perfidulo, pekulo, fia, aĉa aŭ kia ajn. Ni ne plu rilatu al li! Herezulo!

Sed..., kio estas herezulo? Eble, ni devus demandi nian amikon Eŭĝen' Adam' (alidirite Lanti-n), kiu estas sperta pri la temo, tiom multe, ke li eĉ verkis libron kun tia nomo. Li estis kontraŭ dogmigo kaj dogmo, kaj li eĉ kontraŭstarigis tradicion kaj racion per artikolo sia. Nun estas kelke da tradicio en SAT, kaj racio jam ne plu diras al ĝiaj membroj, ke *Ekzamenoj dum la vivo neniam ĉesas*, kiel Renato Korseti memorigis nin laste. SATEcon de SAT oni devas pruvi ĉiun tagon, kaj memkritiko neniam oni devas malpermesi en SAT. Laŭdifine. Sed..., kion diris Lanti pri herezo?, li diris, ke *Herezeco estas nenio alia ol la kuraĝo pensi per si mem*.

Nun ni subeniru al pli sengravaj aferoj, al tial, kial mi membriĝis kaj malmembriĝis al Sennacieca Asocio Tutmonda, kio estas afero, kiun amiko Ĵakvo ankoraŭ ne komprenis, kaj ankaŭ ne komprenis aliaj valoraj homoj, kiuj forlasis aŭ forlasas HALEn, pro tio, ke ili erare kredas, ke HALE estas mi: en la jaro 1999 mi ĉeestis la kongreson de Karlovy Vary kiel ne membro de SAT. Mi intencis lerni pri tio, kio SAT estas, kaj se ĝi konvinkus min, mi aniĝus. Premis min iomete la konsilo kaj konsideroj de Marteno Bustin' Benito, kiu eĉ en artikolo sindemandis iam kial redaktoro de bulteno de asocio aliĝinta al SAT ne apartenis al ĝi, sed al UEA<sup>1</sup>. Kvankam mi jam respondis al tio per mia artikolo *Uea Delenda Est!*<sup>2</sup>, mi decidis je la fino de la kongreso de Ĉeĥio aliĝi al la asocio pro tio, ke mia analizo povas esti malekzakta se farite de ekstere. Mi vidis tie, ke oni povis paroli rec kaj dum tiom longe, kiom oni volas. Mi komentis al apudulo, ke tio ne estas racie, ke oni devus havi regularon por diskuti, per kiu oni ne rajtos trouzi la rajton paroli, kaj oni devus tiel ne rajti paroli pli ol unufoje pri concerna

<sup>1</sup>Kf. N-ro 34<sup>a</sup>, *Informoj de la Prezidanto*.

<sup>2</sup>Kf. n-ro 35<sup>a</sup>, paĝo 17-a.

temo, kaj ne pli ol kelkaj minutoj, ĉar se 166 kongresanoj —tiom multis ni tiam— farus tion, la kongreso neniam finus. Mi ne scias kiel kaj kial, la venontan matenon la Plenumkomitato diris, ke oni akceptis tion, kaj oni faros tion! Mi ne proponis, mi eĉ ne rajtis proponi, ĉar mi ne estis ano de SAT tiam. Eble mi ne ĉeestis la proponon kaj diskuton pri tio, eĉ se mi kredas, ke mi mankis al neniuj diskuto de tiama kongreso, ĉar mi ne vidis tiun decidon okazi. Ne ŝatis mi tion, ke komitato povas decidi per si mem tion *kontraŭ tradicia kutimo de SAT*. Ne mankis anoj, kiuj akre protestis kontraŭ tio, sed ankaŭ ili ne proponis voĉdoni kontraŭ tio denove. Ankaŭ tio ne plaĉis al mi. Je la fino de la kongreso, oni demandis al mi, ĉu mi aliĝos al SAT, kaj mi respondis ke jes. La sekvinta kongreso estis tiu de Moskvo, kaj kvankam mi ja deziris ĉeesti, mi ne povis. Mia veninta kongreso estis tiu de Nagykaníša, kiun mi prirakontis mallonge en la lasta numero de *Kajeroj el la Sudo*.

Nun estas la akuzoj de ekskamarado Ĵakvo: 1 mi misuzas mian povon kiel redaktoro ataki SATon, 2 mi mensogas, 3 mi altrudas al la kongreso mian opinionon, 4 mi ne respektas opiniojn de aliaj SATanoj, 5 mi manipulas ideojn malantaŭ SAT, 6 la tekston de la Konvencio de Gotemburgo montras mian malhonestecon kaj manipolucion, 7 mi ne vidas, ke kamaradoj de SAT estas toleremaj. Mi kredas, ke mi ne forgesis iun ajn akuzon.

Ne gravas, ke mi estas la akuzato, gravas, ke oni povas eltiri tiom multe da sensenco el simple rajto ekŝiĝi de asocio, kiu laŭ onia libera opinio ne plu trafas sian celon.

*7 Mi ne vidas, ke la kamaradoj estas toleremaj*, evidente pro tio, ke ili aŭskultis min, tiel, kiel la tradicio de SAT jam postulis. Evidente mi vidis, do tiu akuzo malveras.

*6 La tekston de la Konvencio de Gotemburgo montras mian malhonestecon kaj ma-*

*nipulacion*. La citata konvencio ja asertas en sia 9<sup>a</sup> punkto, ke oni propagandu pri SAT. Tamen, nenie en tiu konvencio diras, ke oni ne rajtas kritiki SATon. Aliflanke la punkto 20<sup>a</sup> de la Statuto de SAT diras, ke *La kongreso esprimas pri ĉiu propono sian opinionon aproban aŭ malproban. Referendumo findecidas pri ĉiuj proponoj*. Tion oni ne faris en Nagykaníša, kiel mi diris en la antaŭa numero. Kie estas la manipulado? Ĉu eble en tio, ke oni ne referendumis aŭ almenaŭ voĉdonis pri mia propono? Oni ŝanĝis ĝin antaŭ voĉdono: jen la manipulado, kaj se laŭ Ĵakvo *malhonesteco*, tamen *ne mia*.

La 5<sup>an</sup> akuzon mi prikomentos kune kun la 1<sup>an</sup>, ĉar fakte estas la sama. Pri la 4<sup>a</sup>, ke mi ne respektas opiniojn de aliaj samideanoj, tio estas fakte nevera. Mi kontraŭstaris nenies opiniojn en Nagykaníša, kaj ankaŭ mi neniam rifuzis publikigi ĉi tie artikolon baze de tio, ke mi ne konsentas pri la enhavataj ideoj, kiel mi pruvis per la publikigo de la artikolo de falangisto Fernando de Letamendía, kies ideologio estas fremda kaj mala al mia sensitiveco. Pri la 3<sup>a</sup>, ke **mi altrudas al la Kongreso mian opinionon**, tio ja estas bizara maniero priskribi la rajton libere paroli en kongreso de SAT! Oni daŭre provis revertumigi mian proponon, kaj sekve mi devis reklarigi. Oni dezirus tiam, kompreneble, ke mi silentu, sed tio estas lukso, kiun mi ne povis permesi al mi kaj oni ne rajtis devigi tie. Pri la 2<sup>a</sup>, ke mi mensogas, mi havas nur la tutan asembleon de SAT kiel atestantojn pri tio, kio okazis tie: oni koruptis simplan proponon kontraŭ seneŭropigo de parto de Eŭropo fare de la alia parto, en abstraktan kondamnon kontraŭ senriĉigo

## Enkonduko en muzikon

### Viŭelo

En Hispanio estas tradicio gitara de multe da jarcentoj. Homoj ne aparte instruitaj pri muziko uzis ĝin, dum nobeluloj kaj erudiciuloj uzis la *vihuelan* (viŭelo, hispanigo de *fidula* aŭ *violo*) de la jarcento 12-a al 16-a. En nia literaturo oni referencas la instrumenton de la jarcento 13-a, sed ni havas literaturon por la instrumento de multe pli malfruc. Dum en tuta Eŭropo furoris la uzon de liuto, en Hispanio viŭelo regis, eble pro tio, ke la eŭropa instrumento memorigis la araban *ud*, kiu fakte estas longokola liuto ludata per plektro.

Viŭelo havis kvin parojn da kordoj, kaj simplan senparan unuan kordon, kiu kantis *sole* ĉar ĝi estis la plej akuta, kio evidentigas, ke oni ludis la instrumenton per sendependaj fingroj de la dekstra mano, dum tiutempan gitaron oni ludis per la teĥniko de *rasgeo*, tio estas, ŝovante la dikan kaj la indeksan fingrojn de tiu mano tien-reen laŭ la *kvar kordoj*, kiujn gitaro havis tiam, kio sufiĉis por akompani kanton. Laŭ popolanoj, nobelulo ludis la gitaron *alian*, kaj ambaŭ vortoj ankoraŭ sinonimas en kelkaj partoj de nuna Hispanio kaj Sudameriko.



Bedaŭrinde, viŭelo naskiĝis en tempo de milito inter kulturoj, kaj oni ne havis tempon por noti muzikon. La notsistemo estis tablaturado, kaj estas rimarkinde, ke jam Alfonso X *la Saĝa*, reĝo de Kastiljo, citas la viŭelon en siaj kodeksoj, en kiuj aperas bildoj pri ĝi, sed ne aperas la muzikon de la instrumento mem.

La pecoj por viŭelo, kiuj venis al ni, aperis en la jarcento 16-a, de 1536 al 1576. Estas nur ok libroj: *La Maestro*, de Ludoviko Milan' (1536), *La ses libroj de la Delfino*, de Ludoviko Narvaez (1538), la *Tri libroj pri muziko en cifero por viŭelo*, de Alonso de Mudarra (1546), la *Silva da Sirenoj*, de Diego Pisador (1552), *Orfenika Lira*, de Miguel de Fuenĝana (1554), la *Deklaracio pri instrumentoj*, de Johano Bermudo (1555), kaj *La parnaso*, de Esteban Daza (1576).

En la 20-a jarcento denove naskiĝis intereso pri viŭelo, kaj estas kelkaj grandaj koncertistoj pri ĝi, kiel José Miguel Moreno kaj Ernesto Bitteti, kiuj same elstaras kiel gitaristoj kaj viŭelistoj.

Krom la verkoj de Ludoviko Milan', la peco de mi preferata estas la *Variaĵoj* (diferencoj laŭ li) pri la temo *Konservu la bovinojn por mi*, de L. Narvaez, kiun oni aŭdas, se oni legas min en Interreto.

Alonso de Mudarra havas tre interesan *Fantazion 10-an, kiu ŝajnigas la harpon je la maniero de Ludoviko*, kiu estas vera studo harmonio de viŭelo.

*Jesuo de las Heras*



## BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfn° (00 34) 615  
E30080 MURCIA, 427 143  
HISPANIO

Retskribu al  
[jesuo@ono.com](mailto:jesuo@ono.com)

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>

<http://kajeroj.50megs.com>

[Esperanto@iespana.es](mailto:Esperanto@iespana.es)

### STATUTO de SAT

#### PLENUM-KOMITATO

9. La gvidado de la Asocio estas komisiata por tri jaroj al P.K. En okazo de malkonfido tuja revokeblo — Ĝi konsistas el 6-8 membroj loĝantaj en la sama regiono — La pagataj oficistoj de la Asocio povas esti P.K.-anoj, sed ne rajtas voĉdoni pri aferoj koncernantaj sian propran situacion, pli ilia nombro en tiu instanco ne povas superi la proporcion 1:3. — La P.K. elektas inter si prezidanton, kies voĉo estas decida en okazo, se ĉe voĉdono montriĝas egala nombro da por- kaj kontraŭ-voĉoj.
- 10 La P.K. estas elektata de la aktiva membraro per referendumo. La baloto okazas laŭ jena procedo: 5 monatojn antaŭ la koncerna Kongreso, P.K. sciigas en la presorgano, ke ĝia mandato finiĝas. La membraro en iu ajn urbo en la mondo, kunveninte laŭregule kaj decidinte pri tio, rajtas proponi sian urbon kiel sidejon de la Asocio. Ĝi sciigas tion al la funkcianta P.K. kaj samtempe sendas la nomojn de la kandidatoj, kiuj estas proponataj de la loka membraro per plimulto de voĉoj. Ĉi tiu voĉdono okazu per balotiloj sendataj al ĉiuj membroj en la koncerna urbo kaj tiuj balotiloj estu konservataj por ebligi la kontrolon. La kandidataj urboj kaj personoj (nedisigeblaj) stu konigitaj en la presorgano almenaŭ du monatojn antaŭ la kongreso kaj diskutataj ĉe la kongreso. La referendumo findecidas. Nova P.K. ekfunkciu post konstato de la rezultato de la referendumo, kiu sekvas la kongreson, sed plej malfrue la 1-a de marto.

*La 4<sup>te</sup> paĝo de la Statuto de SAT*